

センター通信

第250号

2006年12月20日発行

名古屋エスペラントセンター Nagoja Esperanto-Centro
461-0004名古屋市東区葵一丁目26-10ユニブル新栄301号
郵便振替 00840-8-40765 [名古屋エスペラントセンター]
<http://homepage2.nifty.com/nagoja-esperanto/>



Zamenhofa Festo 2006

出席は14名。うち、日本人以外は、メネーゼス氏、ニャーさん、メネーゼス氏の知り合いの日系ブラジル人2名の計4名。(名古屋エスペラントセンター事務所にて)

目次

Zamenhofa Festo 2006-----	1
NEC図書部より-----	2
Poŝhorloĝo-----	3
Lydia el Estonio vizitis nin en Nagojo-----	6
Kursanoj skribis pri sinprezento-----	7
LA BALDAŬA CENTJARIĜO DE LA AGADO DE JAPANOJ EN BRAZILLO-----	8
第92回世界エスペラント大会(横浜)広報資料-----	9
野村理兵衛さんのこと / 名古屋のザメンホフ祭-----	10
編集後記-----	10

【NEC図書部より】スコットランドの詩人ウィリアム・オールドが今年9月に亡くなりました。エスペラントで多くの著作があり、名古屋エスペラントセンターに在庫しているこの人の著書は次のとおりです。

著書


pajleroj kaj stoploj: elektitaj prozaĵoj
en barko senpilota
la fenomeno esperanto
humoroj
kvaropo
paŝoj al plena posedo
unufingraj melodioj

訳書

la hobito aŭ tien kaj reen
jorgen
la mastro de l' ringoj

関連書

lingva arto: jubilea libro omaĝe al william auld
kaj marjorie boulton
du intervjuoj: interparoloj kun kalman
kalocsay kaj william auld
la degenero de william auld
ankoraŭ pri la degenero de william auld



Poŝhorloĝo

Antaŭ nelonge mi aĉetis poŝhorloĝon, kiu montras ne nur tempon, sed ankaŭ datojn monatan kaj semajnan, kaj eĉ la nunan monaton mem kaj lunaĝon bilde. Multifunkcia horloĝo! Mi ĝis nun uzadis nur pojn-horloĝon (aŭ brak-horloĝo) kaj estas la unua sperto al mi porti poŝhorloĝon.

Nuntempe porti horloĝon signifas preskaŭ ĉiam porti pojnhorloĝon, sed antaŭ la aviadila epoko oni uzadis nur poŝhorloĝon por ĉiutaga uzo, sed post ekuzo de pojnhorloĝo fare de pilotoj, pojnhorloĝo anstataŭadis poŝhorloĝon.

Disvastiĝo de pojnhorloĝo estas neceso de moderna epoko, ĉar ĝia avantaĝo super la poŝhorloĝo estas evidenta: Oni povas rapide kontroli la tempon simple etendante la brakon. Kaj malofte oni pretervole faligas la pojnhorloĝon surteren.

Kvankam poŝhorloĝo estas eksmoda kompare kun pojnhorloĝo, ĉiam estadis homoj kiuj preferas ĝin. Ekzemple tiuj kiuj havas alergion kontraŭ metalo. Ankaŭ estas tiuj kiuj simple pensas ŝika porti poŝhorloĝon.

Sed miakaze la kialo estas iom alia. Mi antaŭ nelonge eklernis ĵongladon. Sed por ĵonglado pojnhorloĝo estas ĝenaĵo. Ĉar mi ne preferas ĉiufoje demeti ĝin de la pojno, do mi simple decidis aĉeti poŝhorloĝon.

Kvankam poŝhorloĝo ne estas tre praktika en la rapida moderna vivo, estas plezure senti la brakon tute liberigita de peza horloĝo. Alia bona flanko de poŝhorloĝo estas ke la ciferplato estas kompare pli granda, kaj sekve pli facilas legi la tempon.

Oni pendigas la ĉenon ĉe la butontruo aŭ bendo kaj metas la horloĝon en la poŝon. Ĉu vi ne trovas en via ĵinso poŝeton ene de poŝo? La poŝeto estas origine por horloĝo, sed nuntempe ĝi estas ali-nomata moner-poŝo.



Lydia el Estonio vizitis nin en Nagojo



Lingva volontulo s-ro Akira
Isobe gvidas Centrair.



S-ino Lydia Lindla vizitis kunsidon de Nagoja Esperanto-Centro vesperon de la 4a oktobro. Ŝi flugis el Estonio, unu el la Baltaj Landoj kaj alvenis antaŭ du tagoj sur la haveno Centrair. Ŝi estis ĝoja vidi Nagojon kaj konatiĝi kun japanaj esperantistoj kun vespermanĝo. Lydia parolis pri sezono kaj historio kaj popolo de sia lando montrante turismajn broŝurojn kaj bildojn kaj fotojn. Dika vortaro (Esp-Eesti Sõnaraamat) kaj aliaj libroj (turismo, historio de Estonioj, malnova rakonto) estis transdonitaj al la manoj de s-ro Suzuki kaj li donis al ŝi eldonaĵon de NEC, t.e. Zamenhofa Ekzemplaro.



自己紹介 Kursanoj skribis pri sinprezento.

Mia nomo estas Hori Kazuko.
Mi lernas Esperanton dum ĉirkaŭ unu jaro sub la gvido de Kuroyanagi.
Ankaŭ antaŭe mi lernis Esperanton, sed mi estas ankoraŭ komencanto.
Mi estas Oomotano.
Oomoto estimas Esperanton.
Tial mi lernas Esperanton.
Mi naskiĝis en Tokio.
Nun mi loĝas en Moriyama-ku, Nagoya urbo.
Mi havas edzon kaj tri filojn.
La dua filo kaj la tria filo edziĝis.

Mia nomo estas Mori Sigeko.
Mi loĝas en Nagoya-urbo kun miaj gepatroj kaj fratino.
Kaj ankaŭ laboras en Nagoya. Mi laboras de lundo ĝis vendredo.
Mi eklernis Esperanton eble sub la influo de mia patro.
Ni (mi kaj gefratoj) aŭdis esperantajn kantojn en infanaj tagoj.
Sed, mi kreskis kaj mi forgesis ilin. Iun tagon mia patro demandis al mi,
kiel oni esprimas en Esperanto "Ima nangi deska?" en la japana lingvo.
Mi respondis "kioma horo nun estas?" Li kaj mi ambaŭ ĝojis rememori la
vortojn.

Mia nomo estas Kawati Takako.
Miaj familianoj estas mia patrino, mia edzo, tri filoj kaj kvar katoj.
Mi amas rigardi dramon de Suda Koreio.
Mi estas Oomotano.

Mia nomo estas Uriu Hideaki. 瓜生秀明
Mi laboras ofte ĝis malfrua vespero en kompanio de gaso.
Sed merkredo estas speciala tago, ĉar ĉiuj laboristoj en mia kompanio ne
povas labori ĝis malfrua vespero.
Tial mi partoprenas en esperanta kurso de Nagoja Esperanto-Centro en
merkredo.
Bonvole gvidu min, mi petas.

LA BALDAŬA CENTJARIĜO DE LA AGADO DE JAPANOJ EN BRAZILO

Mario José de Menezes

K a r a j
gesinjoroj, karaj
gesamideanoj.
Oni invitis min
paroli pri la
centjariĝo de la
elmigrado de
japanoj al Brazilo.
Vere, la centjariĝo
okazos en 2008.
Tamen, por la
hodiaŭa prelego,
mi volas prezenti
al vi kelkajn
informojn pri la
afero, ĉar en
Brazilo la
ankoraŭ vivantaj
japanoj kaj la
japandevenaj
homoj preparas
grandan feston por memorigi la okazaĵon.



Elmigrado

Japanio kaj Brazilo subskribis la unuan kontrakton pri amikeco, komerco kaj navigado en novembro de 1895. En 1960, ili subskribis la akordon pri migrado kaj koloniigado. Kaŭze de la demografia krizo en Japanio, Brazilo akceptis la unuan grupon de elmigrantoj en 1908. Estis 165 familioj kiuj transmarigis en la ŝipo Kasato Maru, por labori en agrikulturo, precipe en la kafplantejoj de la ŝtato San Paŭlo. La laborkondiĉoj en la komenco de la 20-a jarcento estis tre malfacilaj. Tamen, ĝis 1914 venis 14.983 homoj plu, 17-oble de la unua aro. Kaŭze de la unua mondmilito, la elmigrado eksplodis, kaj en 1940 estis jam 164.000 japanoj en Brazilo.

Malfacilaj tempoj

Tiuj japanoj, kiuj multnombre venis en Brazilon, jam ne laboris en kafplantejoj plu. Ili sin dediĉis al aliaj aktivecoj kaj ankaŭ disvolvigis la kulturadon de fragoj, teoj kaj rizo, inter aliaj al neagrikulturaj aktivecoj. Okaze de la dua mondmilito, tiuj enmigrintoj kiuj venis el la landoj de la nomitaj landoj de la akso, kiel Italio, Germanio kaj Japanio, estis persekutitaj de la brazila registaro, kaj iliaj lingvoj fariĝis malpermesitaj. Japanoj kiuj loĝis ĉirkaŭ la marbordo estis devigitaj translokiĝi al internlando. Japanaj lernejoj estis fermitaj. Post la mondmilito aperis la organizo Shindo Renmei, kiu persekutis japanojn kiuj kredas ke Japanio perdis la militon. Inter 1946-47, ĝi mortigis 23 homojn. La krimuloj estis arestitaj kaj aliaj membroj estis deportitaj.

La decido resti

Post la dua generacio, la japandevenintoj ne plu restis en izoleco. Ili sentis ke ne plu eblis reiri al Japanio. La nepoj de japanoj eksentis sin brazilanoj ĉar ili estis kreitaj ene de la brazila kulturo. Nuntempe, nur 10% de la sansejaro parolas la japanan lingvon. Post la 70-aj jaroj la geedziĝo kun la ne japandevenintoj fariĝis normala okazaĵo, kaj 30% de ili estas miksrasaj. Kadre de tiu situacio, la japandevenintoj ekludis grandan rolon en la brazila socio.

La progreso pere de ili

Tuj kiam la nikkejoj en Brazilo decidis adopti la landon kiel sian patrolandon, ili ekaperis en ĉiuj sektoroj de la nacia vivo, en la Ŝtato San Paŭlo, kiel unua-rangigitaj. Eble, kaŭze de la maniero eduki la infanojn, la nikkeja junularo en Brazilo ĉiam aperas bone klasifikitaj en universitatoj kaj aliaj lernejoj. Nuntempe, ili okupas altajn rangojn en la diversaj entreprenoj en la brazila socio. Konsiderante ke la japanoj alvenis al Brazilo ekde malpli ol jarcento, kaj ili havis procezon de kulturiĝo iom malrapida, se oni komparas ilin kun aliaj grupoj de enmigrintoj, oni vidas ke ili bone sukcesis. Ili estas malpli ol 1% de la brazila enloĝantaro, sed iliaj familinomoj aperas en preskaŭ ĉiuj segmentoj de la brazila socio. Ĉiamaniere nikkejoj estas en pli bona financa stato ol la mezumo de la brazilanaro mem. Ili havas bonegan eduknivelon kaj elstaras precipe je liberalaj profesioj tiaj kiaj kuracistoj, profesoroj, inĝenieroj, esploristoj, instruistoj, teknikistoj k.a. aŭ en administraj oficoj. La zorgo de la enmigrintoj pri la antaŭrimedo de eduko al siaj gefiloj, konduto kiu estas propra de japanoj, bone rezultis: ĉirkaŭ 15% de la lokoj disponeblaj por studi en famaj universitatoj estas okupataj de nikkejoj. En la plej fama universitato de Ŝtato San Paŭlo (USP- Universitato de San Paŭlo) 15% de la studentoj kaj 10% de la profesoroj estas nikkejuloj. Ekde la 50-aj jaroj la japanoj (el Japanio) mem ankaŭ elektis la Ŝtaton San Paŭlon por instalii fabrikojn de diversaj produktoj, tiaj kiel teksaĵa, maŝina, nutraĵa i.a. Ili tiom ŝatis la merkaton, ke eĉ la granda Toyota mem instalis tie, sian unuan fabrikon eksterlande, en la fino de la 50-aj jaroj.

La nikkejoj en la nuna Brazilo

Ilia influo en la vivo de la brazilanoj estas grandega. Ni vidu kelkajn aspektojn de ilia graveco: Kulturo-lingva, kuirarta, sporta, industria, komerca, agrikultura, scienca, politika. Nuntempe, kelkaj vortoj el la japanlingvo jam estas aldonitaj al ĉiutaga vortaro de multaj brazilanoj, precipe ties el Ŝtato San Paŭlo: tatami, judo, undoukai, matsuri, tenpura, sushi, yakisoba, bunkyou, k.t.p. La japana kuirarto estas jam disvastigita en la mondo. Same kiel okazas en Brazilo. Kaj la superbazaroj ebligas la aĉetantojn aĉeti el specialaj standoj por japanaj produktoj.

Sportoj tiaj kiel judo, karateo, kendoo, sumoo, ajkidoo, ĝiugicuo, basbalo estas multe ŝatataj kaj ludataj. Estas ankaŭ kelkaj menciindaj okazaĵoj rilate al la japanaj sportoj alportitaj al Brazilo.

En la komenco de la 20-a jarcento la Grafo Koma, Mitsujo Maeda, instruis ĝiugicuon al brazilano Grejsje, kies familio zorgis pri tiu sporto dum preskaŭ unu jarcento. Tiu sporto preskaŭ malaperis en Japanio, tamen lastoktobre, en la regiono de Ajase, en Japanio okazis la Azia Ĉampioneco pri Brazila Ĝiugicuo, kun la partopreno de atletoj de multaj landoj de la mondo. Do, sporto kiu estis malpermesita en la Meĝi Erao, nun revenas al Japanio pere de brazilanoj.

Judo ankau estas instruata de japanoj kaj nikkejoj, kaj ĝi multe prosperas en Brazilo. Ĝi estas tre ŝatata, kaj brazilanoj jam gajnis medalojn en olimpiadoj (bronza, arĝenta kaj ora), kaj kelkaj medaloj estas gajnitaj de nenikkejuloj!!

Sumoo, kiu estas ludata de viroj en Japanio, en Brazilo estas ankaŭ ludata de virinoj. Lastoktobre okazis en Oosaka, la dekkvara Monda Ĉampioneco pri Sumoo, en

kiu unuafoje en ĝia historio okazis porvirinaj matĉoj kaj inter 34 landoj kiuj partoprenis en la evento, du brazilaninoj, nenikkejaj, gajnis bronzajn medalojn.

Famaj fabrikoj de Japanio, tiaj kiel Honda, Toyota, Mitsubishi, k.a estas instalitaj en Brazilo de longe.

Rilate al la arto, ni havis faman pentriston, jam forpasintan, kies nomo estas Manabu Mabe, internacie konata. Nuntempe, viglas en la arta medio la produktistino kaj reĝisorino Ĉizuka Jamazaki, kiu, lastjare, estis en Japanio, por lanĉi sian lastan filmo ? Gaiĝin 2, Amu min ĝuste kiel mi estas? en Tokio kaj en Nagojo, por la brazila komunumo vivanta en Japanio. En la brazila televido, mondfama pro siaj dramserioj, nuntempe nikkejoj jam partoprenas en dramserioj, filmoj kaj amuzspektakloj same kiel la nenikkejoj mem.

Eĉ en la politika medio, nikkejoj distingiĝas. Ili aperas kiel ŝtataj deputitoj, federaciaj deputitoj, urbleĝfarantoj kaj ankaŭ kiel urbestroj. Mia urbo mem estas regata de filo de japano, ekde ses jaroj; lia nomo estas Gungi Abe, kaj li finas lian duan 4-jaran mandaton. Ni ankaŭ havis nikkejulon kiel Ministro de Minejoj kaj Energio: Sigeaki Ueki. Ueki estis la plej juna homo kiu okupis tiun oficon; li estis 38 jaraga tiam. Li ankaŭ estis direktoro kaj prezidento de Petrobras, la mondkonata brazila petrolokompanio.

Fero kaj Ŝtalo en Japanio

Lastjare Brazilo festigis gravan okazaĵon en la rilatoj inter Japanio kaj Brazilo. Okazis la duoncentjariĝo de la komerco de fererco al Japanio. En 1955 Kompanio Valo de Dolca Rivero (CVRD) ekvendis al Fuji Steel la unuan ŝarĝon el fererco. De tiam niaj rilatoj multe kreskis, kaj nuntempe ni liveras ferercon al grandaj ŝtalkompanioj tiaj kiel Nippon, Sumitomo, Kobe k.a. Por kontentigi la neceson de Japanio ni konstruis specialan havenon por enŝipigi la ferercon al Japanio, kaj Japanio faris ŝipon por transporti po 360.000 tunojn.

Futbalo Japana

Oni scias ke ĝis antaŭ nelonge, Japanio ne estis tradicia je futbalo. Nuntempe Japanio bone partoprenas en Futbalaj Mondaj Pokaloj. Japanio ekeniris en tiun mondŝatatan sporton post kiam ĝi decidis sin prepari, kaj ankaŭ sendis kelkajn ludistojn por koni la manieron ludi en Brazilo kaj iom vivi tie, inter la brazilanoj mem.

Hodiaŭa fluo de japanoj al Brazilo

En Japanio estas du konsulejoj de Brazilo. Unu el ili, en Tokio, akceptas homojn vivantajn en la meza kaj pli norda partoj; la dua, tiu lokita en Nagojo, akceptas homojn vivantajn en la meza kaj pli suda partoj. En mia ĉiutaga laboro tie, mi povas sekvi la fluon de japanoj al Brazilo. Ĉi-jare, mezume, monate ĝis la fino de oktobro, el ĉi tiu regiono, iris al Brazilo, kiel

- Turistoj, 618 homoj
- Futbaltrejnantoj aŭ kulturinterŝanĝantoj, 6
- Negocistoj, 223
- Studentoj, 4
- Laborantoj, 48
- Religiuloj, 2
- Konstantaj enloĝantoj, 9

Pro tio, la pli ol 1.500.000 japandevenintoj kaj la ĝis nun vivantaj japanoj kiuj loĝas en Brazilo, intencas festegi la centjariĝon de la surlandiĝo de tiuj 793 homoj kiuj decidis elmigri al Brazilo en 1908, kaj Brazilo mem omaĝas iliajn posteulojn kiuj restis en la Nova Mondo, en Brazilo.

Dankon al ĉiuj. Bonvolu fari demandojn, se vi volos.

第92回世界エスペラント大会



期日： 2007年8月4日(土)～11日(土)

主会場（各種会議場）： パシフィコ横浜

副会場（式典・演芸大ホール）： 横浜みなとみらいホール

副会場（音楽・演劇ホール）： 神奈川県立音楽堂

第92回世界エスペラント大会（横浜）広報資料のご案内

（財）日本エスペラント学会；162-0042新宿区早稲田町12-3

電話：03-3203-4581 ファックス：03-3203-4582

メール：esperanto@jei.or.jp

（1）ポスター

- ・エスペラント／日本語
- ・A2版（約42センチ×60センチ）片面，カラー
- ・デザインはLa Revuo Orienta 7月号裏表紙を参照
- ・画像提供：株式会社みなとみらい21
- ・1枚150円（制作実費）＋送料（箱代60円を含む）
- ・通信頒布の場合の送料目安

1枚～2枚 ポスター代＋切手200円＋箱代60円

3枚～5枚 ポスター代＋切手240円＋箱代60円

6枚～13枚 ポスター代＋切手390円＋箱代60円

（2）絵はがき

- ・エスペラント／日本語
- ・官製はがきサイズ，片面カラー，他面はがき仕様
- ・パシフィコ横浜，インターコンチネンタルホテル，赤レンガ倉庫，ランドマークタワーなど，海側から見たみなとみらい地区全景
- ・画像提供：財団法人横浜観光コンベンション・ビューロー
- ・1枚10円（制作実費8円＋UK基金あて寄付2円）＋送料

・多数枚をまとめて注文した方が，送料がお得です

（3）広報チラシA

- ・表面はエスペラント／日本語，カラー。絵はがきと同じ画像。A4横長
- ・画像提供：財団法人横浜観光コンベンション・ビューロー
- ・裏面に日本語で横浜世界大会の詳細情報（UKについての説明，横浜UK概略プログラム，協賛団体名，後援，国内準備委員会顧問，問い合わせ先など）
- ・日本大会，連盟大会などで，参加者に配付します

・エスペラントと世界エスペラント大会を外部へ広報するための資料です

- ・無料（送料は負担していただきます）

（4）Unua Bulteno de la 92a UK

- ・全エスペラント文
- ・A5版 8ページ（綴じなし）カラー
- ・UEA個人会員にはすでにUEA本部から初版が直送済み
- ・La Revuo Orienta, La Movado, Nova Vojo, La Harmonio 誌などに同封して配付されます。また，日本大会のほか，連盟規模の大会でも資料袋に同封して配付する予定です。
- ・日本語版申込書と郵便振替用紙つき
- ・会誌同封，催し物での配付をご希望の場合，お問い合わせを。

これらの広報資料は，次のホームページでご覧になれます

<http://www.k4.dion.ne.jp/~uk2007/japane/informado.htm>

Zamenhofa Ekzempleraroの著者野村理兵衛さんのこと

野村、安原さんの数え100歳を祝福 南砺市の溝口市長、施設など訪問
新聞より転載

2006/08/23, 北國

南砺市の溝口進市長は二十二日、数え百歳の誕生日を迎えた同市金戸の野村理兵衛さん方と、同市井波の安原トメさんが利用している特別養護老人ホーム「いなみ」を訪れ、それぞれ祝い状を贈った。

野村さんは一九〇七（明治四十）年八月四日、旧城端町西上町に生まれた。同志社大在学中にエスペラント語を始め、国内外を問わず貴重な出会いを経験したという。

安原さんは八月二十二日、東砺波郡高瀬村三清の生まれで、特養ホームでは毎月の法話会を楽しみにしている。

名古屋のザメンホフ祭

第1部 講演会（無料で一般公開。愛知民主会館にて）

演題：「日本ブラジル交流の100年」

講師：マリオ・ジョゼ・メネーゼス氏（在名古屋ブラジル領事館副領事）

伊藤俊彦氏が講師紹介を行った後、メネーゼス氏が演壇に立ち、みずからプロジェクターを操作しながら話した。日本語逐次通訳には猪飼吉計氏が当たった。出席は22名。中日新聞にも予告案内が掲示されたが、出席者のほとんどがエスペラント関係者。ブラジル移民が始まって2008年で100年を迎えること、日系ブラジル人が多数いることなどの理由からこの演題を選んだが、一般の人の関心は薄かったようだ。内容は、余り知られていない移民初期のことから現在の日本とブラジルの関係まで多岐にわたり、興味のある話だった。（講演内容は本号6ページ参照）

第2部 懇親会（名古屋エスペラントセンター事務所にて） 飲み物、つまみや食事を囲みながらの立食パーティで、各自がエスペラントで自己紹介の後、懇談。余興として猪飼氏が多目的頭巾バフ(www.buff.es/)の紹介をし、山田義氏が自ら出版した『エスペラントでうたう日本の歌』を提供して歌唱指導を行った。出席は14名。うち、日本人以外は、メネーゼス氏、ニャーさん、メネーゼス氏の知り合いの日系ブラジル人2名の計4名。いったん散会した後、居残った人たちは川合隆史氏が語る船員時代の思い出話に耳を傾けました。【写真】は1ページに。

編集後記 年内に250号発行できました。三重県の山本修さんが丁寧に校正してくれました。ご協力感謝します。 山田義

